

La gazetaro estas simile al la torentoj: ĝi braviĝas kaj plirefortikiĝas per la baroj.

RENAUDOT.

Studi en ĝia ĝeneraleco tiujn sennombrajn organojn de la gazetaro estas studi la animon, la karakteron, la tendencojn politikan kaj literaturan, la progresanostaton de unu nacio; ĉar se tio estas vero ke la literaturo reflektas la morajn kaj kutimojn de unu epokdaŭro, tiu vero estas ja prave aljuĝinda al la gazetaro, vasta dioramo, en kiu oni prezentas per serio da moveblaj kaj ŝanĝeblaj tolaĵoj, ĉion, kio ekzistas la scivolemon, ĉion, kio flamigas la animojn, ĉion, kio rilatas al la konceptaĵoj de la ŝtatesto kaj al la superaj penoj de la popoloj.

E. HATIN.

(El hispana lingvo tradukis esperante)

NOVEJARQUE (ANGELO)

Valencio.

MILITSIPARO MARVETURANTE TRA LA KAMPARO

HISTORIAJ PAĜOJ

Ne ofte okazas, ke multnombra eskadro translokiĝu de maro kie ĝi marveturas, kaj tra larĝa koltero, internen de fermita haveno, anstataŭ ol trankvile eniri la havenan buŝon. Tamen por pruvi kiel ne trovante alian solvon, sufiĉas energia karaktero apogita de la entuziasmo de venkema armeo por intenci atendante sukceson, la plej kuraĝegan entreprenon, mi nun rakontos la jenan okazintaĵon, preskaŭ la sola kiun mi trovis traŝercante la Historion.



(Medaliono ĉizita de Gentil Bollin)

Ĝin forgesante, li ne atentis malgrandajn entreprenojn, nur atendante taŭgan okazon por plenumi kion li interne tiel deziregis.

La Ragusa respubliko, tiel kiel l' apudaj ŝtatoj, al fortikeya otomana Imperio, rapidis sendi pacaĵn ambasadorojn, por renovigi siajn amikajn


La 8^{an} Februaro de 1451^a, tri tagoj post la morto de sia patro Murad'o, ricevis Mohameto II^a (la tiama kronprinco) pergaminon de la turka veziro lin alvokante por regi la senestran Imperion. Ĉi tiu princo rapidis sin pretigi por akcepti la tronon de la Osmalinoj kie tiom da gloro li devis atingi.

La konkero de Konstantinoplo, ĉefurbo de la lastaj restaĵoj de tiu potenca Greka Imperio fondita de la Granda Konstantino antaŭ 1.100 jaroj, estis por Mohameto de kiam li komencis regi, la ĉefa ideo de sia menso, kaj ne

interrilatojn, same kiel la greka Imperiestro ankaŭ sendante reprezentanton kiu estis tre bone akceptita de Mohameto, ĉar por ĉi tiu estis konvena kaŝi siajn estontajn entreprenojn.

Sed malsaĝaĵo de la Grekestro rapidigis la proksimecon de sia malfeliĉo.

Ne akurate ricevinte Konstantino (la tiama greka Imperiestro) ian tributon pagotan de la Sultano, lin minacis pro lia malfruco dirante, *Mi estas preta liberigi vian fraton Orkan'on kiu estas enfermita en greka karceroj, por ke li ekkomencu interfratan militon en la otomanaj landoj kie la kaptito kalkulas tiom da partianoj.* Ŝajnigante, Mohameto kaŝis komence sian vengon, sed tuj kiam li finis la militpretigojn, perforte ordonis al grekanoj kiuj vivadis en siaj regataj ŝtatoj, forlasi tuj iliajn domojn, forprenante samtempe iliajn



Topografia karto de Konstantinoplo

posedaĵojn. Poste, kaj ne perdante tempon, li konstruigis gradan kastelon en la eŭropa marbordo de la Bosfora Kanalo, kontraŭ la jam konstruigita de Bajaceto en l' azia rando de la sama markolo, tiel devenante mastro por permesi aŭ malpermesi la eniron en la Nigra Maro.

Tre alarmita Konstantino sendis tuj novajn ambasadorojn al Sultano, proponante al li tributon kaj petante samtempe ne daŭrigu lian entreprenon, sed la otomana monarĥo respondis: *Neniu rajtigas kontraŭstari miajn intencojn.* Kaj antaŭ tri monatoj li finigas tiun fortikaĵon kies konstruado okupadis ses mil masonistojn tre entuziasme helpitaj dum ilia tasko eĉ de la imperia nobelaro.

Timegigita la Grekestro, humile petegas ne tuŝu la otomanaj soldatoj, la tritikojn jam tre elkreskitaj de siaj regatoj, sed la Sultano ne atentante pri tio, ordonis paŝtigi la militajn ĉevalojn en la grekaj kamparoj. La greklandanoj kontraŭbatalas, sed tiam la turkestro buĉigas ĉiujn kiujn siaj soldatoj trovas. Ĉi tia estas la kialo de la milita deklaro.

Komence de l' aprila monato (jaro 1453^{an}) alvenas Mohameto kontraŭ Konstantinoplo kunportante multenombrian armeon, (200,000 soldatoj) kaj ĉirkaŭas la ĉefurbon per multaj baterioj. La 15^{an} de la sama monato aperas al suda eniro de la Bosfora markolo, 220 militaj ŝipoj grandaj kaj malgrandaj, kiuj apartenis al la turka eskadro. Tiam komencis seriozan sieĝon.

Post kelkaj tagoj, ŝipareto kiu konsistis je granda greka ŝipo, kaj kvar aliaj, apartenantaj al la Genua Respubliko, sukcesas rompi la blokadon kaj feliĉe eniras la havenon venkinte samtempe multenombrian malamikan divizion. La Sultano kiu avide rigardadas de l' apuda marbordo tiun herindan marbatalon, koleriĝas vidante la hontindan turkan malvenkon, kaj enirigas sian ĉevalon en la maro, ŝajnigante ke li volas forpreni la venkon kiun kunportas la grekaj ŝipanoj. Poste por venĝi tiun malbonaĵon knutbatigas publike la turkan admiralon Balta-Oghlon.

Ne povante la otomana armeo entute ĉirkaŭi la sieĝantan urbon, ĉar oni ne trovis solvon por eniri perforte la havenon kies buŝo estis fermita per dika fera kateno, Mohameto elpensis la kuraĝegan ideon transportigi tra la kamparo la militan ŝiparon. Tiu ĉi fakto, pri kiu multaj generaloj opiniis


esti nur revo kaj vera neblaĵo, sukcesis rapide dank' al granda entuziasmo kiun posedis la tuta turka armeo.

La granda koltero kiu apartigas la Marmaran Maron de la Konstantinopla haveno estis kovrita per multaj trabaĵoj kunigitaj unu apud l' alia, kaj tre bone ŝmiritaj per bova graso.

Tiam la turkestro elektis el la eskadro 70 ŝipojn kaj, ilin trenigante per bovoj tra tiu glitiga kaj improvizita vojo, sukcesis ilin transporti en la Greka flanko. La sekvantan matenon je la ektagiĝo estis ankrita meze de la haveno kaj kun granda miro kaj surprizo de la sieĝitoj, la malamika ŝiparo.

Provis tiam la Genuanaj maristoj, kiuj estis liganoj de la grekoj, bruligi la ĵus alvenintaj ŝipoj per la greka fajro, sed la turka ŝipestro jam pretegitaj sukcesis funden irigi la ĉefan ŝipon de la genuanoj, samtempe dronigante la tutan ŝipanaron. Tiel la sieĝitoj restis tute sen espero.

Jam plenumita per ĉi tiu venko la unua parto de sia entrepreno, Mohameto konstruigis boatajn ponton por pli bone faciligi la eniron en la urbo al la sieĝinta



Transportado de la ŝipoj

armeo. Tiam la malfeliĉaj grekanoj ne atendante novan helpon decidis mortigiĝi, sed mortigante samtempe.

Sieĝintoj kaj sieĝitoj sovaĝe interbataladas ĉiutage, ĉiu turka atako estas forpelita de la kuraĝegaj grekanoj, ĝis kiam post 50 tagoj sieĝante la urbon, fine la otomana artilerio sukcesas teren faligi kvar defendatajn turojn kaj tuj malfermi larĝan truon en la remparo. Tiam Mohameto ordonas al sia armeo lastan ĝeneralan atakon, kaj malgraŭ la pluvego da kugloj kiuj eliras el la remparaj embrazuroj, ĝi perforte malfermigis pordon kaj l' atakantoj eniras la urbon. Konstantino unuavice batalante, trovas gloran morton,

meze de la otomana soldataro. Lia kapo detranĉita estis sendita poste al Azio, kaj kiel milita garantiaĵo montrita tra la diversaj urboj de la Otomana Imperio.

K. URBEZ.

(Deseknaĵoj de la verkinto)

JE LA MORTO DE ELZA

<i>Gaja junulo</i>	<i>Kaŭzi gajridojn</i>	<i>Kalkulu, kara,</i>	<i>Havas amplekse</i>
<i>Lasu ĉi verson,</i>	<i>Al ĉiuj fraŭloj,</i>	<i>Kiom da sablo</i>	<i>Sennuba nokto;</i>
<i>Nur la malĝojaj</i>	<i>Plorigi ilin</i>	<i>Havas rivero</i>	<i>Se koni volas</i>
<i>Devas legi ĝin.</i>	<i>Mi jam nur povas</i>	<i>En siaj bordoj.</i>	<i>La tutsuferojn</i>
<i>Se iam povis</i>	<i>Per la sopiroj</i>	<i>Kalkulu ankaŭ</i>	<i>Kiuj nuntempe</i>
<i>La sprito mia</i>	<i>De mia koro.</i>	<i>Kiom da steloj</i>	<i>Min malĝojigas.</i>

*Ĉielo, tial ke forprenas
La belaĵon kiun mi amis,
Kial al mi, do vi ne neas
La vivon. kiun ŝi jam perdis?*

*Se kun fidego ŝi min amis,
Kial tiel vi punegas ŝin?
Aŭ kial vi nin diskunigis
Se dolĉa amo kunigis nin?*

*Se estis vera kulpo ami
Ni ambaŭ ŝuldas saman punon:
Se vi deziras nin punegi,
Proviĝu al ni du la morton,*

*Kaj se ni ja ne meritas ĝin,
Kial oni tiel kondamnas
Ŝin je morti kaj je plori min
Pro krimo kiun ni ne havas?*

*Se ŝi naskiĝis por trovi min,
Vere por mi ŝi devus vivi,
Se mi naskiĝis por ami ŝin,
Kune kun ŝi mi devus morti.*

*Ĉar terura ĉagreno estis,
Ekvidante kion mi vidis,
Kaj perdante kion mi perdis,
Sen ke mi tion ja meritis.*

*Se vi diras ke mi ŝin volis,
Malmulte, mia Viktor diras,
Se diras ke mi ŝin adoris
Mian amon vi ne esprimas.*

*Permesu al mi tion diri
Kiel mi nature kulimas:
«Mi mortis nur por ŝia esti
Kaj por plori al ŝi mi vivas.»*

*Mi volus do, amiko juna,
Eĉ esti nekoninta al ŝi,
Sed ne, ĉar la koneco ŝia
Dian plezuron donis al mi.*

*Mi volus do, al ŝi ne ami
Kaj nur esti al ŝi vidinta,
Sed vel estis nepre ŝin vidi
Kaj resti tre enamiĝinta.*

*Mi volus... ho malfeliĉego!
Mi jam ne scias kion peti.
Vidi ŝin estas mia volo
Kaj tuj lastafoje elspiri.*

ESPERANTIGIS V. RENOM.

MEMORINDA EKSKURSO

Antaŭ longaj jaroj, kiam mi estis ankoraŭ lernantino ĉe la mezgrada lernejo por instruistinoj en Lieĝo, ni iun tagon faris ekskurson. Okazis aventuro kiun mi neniam forgesos.

Estis belega ekskurso. Per vagonaro ni veturis ĝis Flémalle-Haute; tie, antaŭ la kastelo de Chokiers, ni transpasis la Mozon en barko, kaj estis promenontaj la tutan posttagmezon en bela arbara regiono. Mi aŭdis ion pri kunveno pro la manĝeto en farmdomo nomata «Arbaro de l' Diablo» (Sart du Diable), kaj pri reveno tra la vilaĝo Engis. Ni estis proksimume dudeko; tri profesorinoj akompanis kaj observis nin.

Post kelkaj minutoj de vojirado sur ŝtonvojo, ni eniris flanke, inter altaj kaj densaj kreskaĵoj, malgrandan vojeton, ege suprenirantan. «Ho la ĉarma vojeto!» mi ekkriis ĝojege. Ni tuj alvenis en densa arbaro, ni marŝis unu post la alia, kaj, pro la agrableco esplori per mi mem tiel belan lokon, mi baldaŭ estis ĉe la kapo de la longa sekvantaro de miaj kunulinoj. Kia rava promonado, kia bonfaranta freŝeco dum tiu varmega somera tago! (Mi memoras ke estis la festo de la Ĉieliro). Mi ĉiam kondukis la gajan ridantan bandon, kaj, kiel ofte okazas kiam oni marŝas antaŭe, mi baldaŭ, nur kun kelkaj kunlernantinoj, pli kaj pli malproksimiĝis de la aliaj. Tra la interspaco ni povis ankoraŭ kun ili interparoli. Sed nun okazis ke la vojeto disduiĝis. Mi ne plu scias kial (eble ni tiel komprenis la vortojn de la instruistinoj), mi, kun du el miaj kunulinoj, eniris la dekstran parton de la vojeto. Kaj ĉiam ni antaŭeniris, ĉiam parolante, de malproksime, kun la aliaj promenantinoj, kiujn ni tute ne plu vidis. Du vilaĝaj knabetoj nin preterpasis. Ĉiam ni daŭrigis nian vojiradon tra la bela densa arbaro. Sed subite la denseco de la arbaro ŝajnis al ni malpli bela, ni sentis ion kiel timeton.

Ni atendis vokante la aliajn; ni neniun vidis, sed voĉoj respondis al nia voĉo. Baldaŭ ĉio estis silenta. Nia timeto fariĝis timo, timego! Ĉu ni devojiĝis, en tiu izola arbaro, en tute nekonita regiono? Ni vokis; ĉiam la sama silento. Estis eble la voĉoj de la knabetoj kiuj unue nin respondis. Estis terura momento. Kion fari? Nedeciditaj, ni iom atendis. Tiam unu el miaj sortfratinoj prenis heroan decidon: «Ne vane mi estas filino de militisto», ŝi ekkriis, «Antaŭen!» Ŝi redonis al ni kuraĝon, kaj ni daŭrigis nian promenadon laŭ la senfina vojeto. Ĝi ne plu estis bela, agrabla. Ni ne plu vidis ĝian ĉarmon.

Fine, ho feliĉo, malgranda lumeto aperis inter la arboj, inter la kreskaĵoj: ni al proksimiĝis je la rando. Kaj baldaŭ ni troviĝis ree sub la vasta, blua, sen nuba ĉielarkaĵo. Sed ankoraŭ, kion fari! Nenia vojo tie aperis. Nur vastega kampo, dolĉe supreniranta, tiamaniere ke ni nenion povis vidi trans ĝi. Nur tre, tre malproksime, la neatingeblan horizonton. Kaj nek unu kamparano tie laboris dum tiu festtago, al neniun ni povis demandi nian vojon. Laŭ unu rando de la kampo ni rimarkis sekan fosajon, kaŝitan inter arboj. Kaj tiun vojon ni laŭiris, ĉar tie oni ne vidus nin, nin, tri elvojirintajn knabinojn en tiu izola loko. Kaj imagu nian teruron, kiam, post kelkaj mi-

nutoj, rigardante malantaŭen, ni ekvidis du virojn kun mieno de vagistoj, starantajn ĉe la rando de la arbaro. Ni ne plu marŝis, ni kuris tra nia profundaĵo. La viroj feliĉe malaperis, eble ili ne vidis nin.

Dum nia simplena kurado ni fine ekvidis, super la arboj, tegmenton de loĝejo. Ĉu vi komprenas nian feliĉon? Estis kredeble la dirita farmbieno de la «Arbaro de l' Diablo». Kaj efektive ŝajnis al ni ke tiu estis la domo de la Malsanktulo. Kia malpura loĝejo! Ne plaĉus al ni tie manĝeti. Ni demandis pri la aliaj; neniun estis jam pasinta. La farmestro montris al ni la vojon, kondukis nin ĝis la plej proksima ŝtonvojo. Ho, nia teruro ne estis forfluginta. Post longega horo ni nur alvenis en vilaĝo, kie ni povus atendi la aliajn; kaj tiu vojo estis tiel izola kiel la arbaro kie ni perdiĝis. Unuflanke vastega profundegaĵo, aliflanke nepenetrebla muro de ŝtonegoj. Ĉiumomente la vojo kurbiĝis, tiamaniere ke ni neniam vidis antaŭ ni ion alian ol la ŝtonegan muron. Ĉiu kurbaĵo de la vojo povis ja rezervi por ni surprizon terurigantan. Ho, se ni ne estus estintaj malfeliĉaj devojiĝintaj edukatinoj, kia bela pentrinda loko tiu estus! Nun ĝia beleco nur pli grandigis la danĝeron. Kaj kiel ofte ni pensis al la aliaj, kiuj certe ankaŭ nin serĉis, kaj maltrankviliĝis pri nia sorto.

Kiel sciigi al ili ke ni retrovis la bonan vojon? Ni havis luman inspiraĵon! En mia poŝo mi havis feliĉe papereton kaj krajonon: «La tri perditaj vin atendos en Engis.» Tiu estus la postsigno de nia trairado. Kaj, por altiri la atenton de niaj amikinoj, ni rompintis branĉeton de arbeto, kaj alpikis al ĝi nian bileteton. Ni kolektis ŝtonetojn ĉe la vojirado, kaj, en ŝtoneta altaĵeto, meze de la vojo, ni plantis nian postsignon kiel standardon. Nun ni estis tute rekuraĝigitaj. Sed apenaŭ ni estis irintaj centon da metroj, post nova kurbiĝo de la vojo ni preterpasis tri junulojn kiuj respektis, sed tre surprizite, nin salutis. Ni daŭrigis nian vojiradon, sed tuj, nova maltrankviliĝo nin ekkaptis: se tiuj sinjoroj vidus nian flagon, se ili revenus, vidinte ke ni estis perditaj! Ĉu mi dirus ke la timo donis al ni flugilojn? Ni kuris, kuris, ĝis fine, kiam denove la vojo kurbiĝis; ni ekkvidis, kiel oazon en dezerto, la tutan vilaĝon sin etendantan antaŭ ni. «Engis! Estas Engis!» Kia ekĝemo de liberiĝo! Trapasinte la ponton sur la Mozo, ni eniris en gastejon proksime de la stacidomo. Ni refortigis nin per bona kafe kun kukoj, dum ni rakontis nian tutan aventuron al la kompatema hotelmastrino. La bona virino, de la pordo de la gastejo, rigardis sur la vojo, kaj fine plezure al ni anoncis: «Jen ili estas! Jen ili estas!»

Mi ne aldonos ke la akcepto de niaj instruistinoj estis precize tute amika. Vi komprenos ilian timegon, se ili estus revenontaj, dum mankis tri ŝafoj el la ŝafaro pri kiu ili estis zorgontaj. Longatempe niaj kunulinoj estis serĉintaj nin en la arbaro; tial la bando estis alveninta post ni ĉe la farmdomo. Tie la loĝantoj estis trankviligitaj ilin pri nia sorto; kaj la eltrovo de nia standardo eĉ estis doninta al ili momenton de vera gajeco.

Nu, «fino bona, ĉio bona», diras la proverbo. Estis la vero. Kaj dum nia reveturado al Lieĝo, la vagonfakoj nur resonis pro la gajaj ridoj de ĉiuj, pri tiu neforgesebla ekskurso.

MARIA POSENAER.

A M O

Dediĉita al la bela rumana fraŭlino C. Rosen

Ŝi estis aĝa je deknaŭ jaroj kaj li je dudek. Amikoj intime de la infaneco sin amis, sin amegis kvazaŭ estus du animoj naskitaj unu por la alia. En la parfumhava arbaro ili pasigis ofte kelkajn horojn sin esprimante sian amon, kiu rememorigis al ili tiujn belajn tagojn de ilia infaneco, kiam tiel gaje amuziĝis, kiam la naivaj ridadoj ellasis el iliaj vizaĝoj en la ludoj.

Ŝi estis beltalia kaj loganta; ŝiaj ellumantaj okuloj parolis mistere al la animo pri iaj belaj aĵoj ĉiam agrablaj; ŝiaj rozkolorigitaj lipoj altiris incitantaj al la ama kiso, ŝia blonda hararo etendiĝis majeste sur la delikataj ŝultroj, ŝiaj dentoj pli blankaj ol la neĝo elmontriĝis allogantaj, kiam la rida elasta kuntiriĝo estis intensa; revemaj ŝiaj okuloj, tentemaj ŝiaj kurbiĝoj, majestaj ŝiaj sintenoj, ŝia talio fleksebla kaj piedoj malgrandetaj kaj delikataj; simila al diino, kiu foririnta el la Olimpo estus alveninta rifuĝi en la teron.

Ĉiam nedisigitaj aliris la preferitan arbaron kie ĉio spiris amo kaj vivo, folipleneco kaj beleco, arbaro kiun tiuj du amantoj estis elektintaj kiel lokon preferindan por okazi iliaj amaj interparoladoj.

Estis ia bela kaj maja vespero en kiu la ellumantaj sunaj radioj etendiĝis sur la tero belege kaj brile, unu de tiuj vesperoj en kiu la poeto altirita de la mirinda kaj agrabla temperaturo sin direktas al la arbaro por ĝui de ĝiaj ĉarmoj kaj belaĵoj kaj impregni siajn poemojn el la plej delikataj sentimentalaĵoj.

Ĉio estis kvietaj, trankvila, nur la melodiaj kantaĵoj de la liberaj kaj gajaj birdetoj kiuj flugetantaj de branĉo al branĉo kantis ĝusttone, la murmuroj de la fontoj, la malproksima sonado de la flutoj de la ridemaj junpaŝtistoj kaj la mildaj kaj agrablaj aerventetoj enpenetrigitaj de ĉarmeco kaj poezio, embarasis la arbaran silentadon.

Ili vojiris malrapide pasantaj antaŭ la arbaraj kaj belkreskaj floroj, murmurante amajn frazojn plenaj de dolĉaj kaj ravaj esprimoj, frazoj impregnita de intensivaj amaj deziregoj.

Apenaŭ alvenintaj, sidiĝis sur la verda herbetajaro kaj favoritaj de la agrabla ombraĵo de la foliplenaj kaj aromataj rozarboj, apude de tiuj kvietaj riveretoj kiuj per ĝiaj murmuroj ŝajnis voli partopreni je iliaj idilioj. Sin amis tiel, ke nur sin dirantetion, pligrandiĝis iliajn korojn per iluzioj kaj esperoj. Amo, amo, estis la vortoj kiuj oftege eliris el iliaj lipoj kun pasiaj kaj deziregaj ekstazo. Ili rigardis unu la alian tiel fikse kaj vivege, ke iu ajn kiu estis ilin vidinte, estus kredinta ke ili parolis per la enigma profundeco de siaj okuloj, kvazaŭ volus eltrovi unu la misterojn enhavitajn en la okuloj de la alia.

Tiun vesperon sin ĵuris eternan kaj fidelan amon, ĉirkaŭpreniĝis iliaj brakoj kvazaŭ volus aŭskulti unu la korbatojn de la alia, elparolis frazojn dolĉajn, plenajn de senfina melankolio kaj amemocio kiujn apenaŭ oni aŭskultis kaj en la vespera silentado oni aŭdis la soneton de du fervoraj kaj amplenaj kisoj, iliaj buŝoj kuniĝis dolĉe per tiu kiso kiu kunigas du animojn kiuj sin amas kaj fariĝas unu sola...

ARTURO TORNE

—Cu vi vidas, sinjoro, kiel ĉarma, sprita kaj malkvietema estas mia fileto?
—Ho, jes, jes, mirindega! : sed diru al mi; je kioma horo oni kuŝigas lin?
(De «Unu fojon»)

AMU MIN!

Ho, kiam al mi, karuleto
Riproĉas vi mankon da ĝoj',
Ĉu scias vi ne la rimedon
Per kiu heliĝus la voj' ?
Ho, amu min!

Ho, tiam, por vi, karuleto,
Matene mi ĝis la vesper',
Nur kantis plej gajajn kantetojn,

Nur konus feliĉon sur ter'.
Ho, amu min!

Ho, ĉiam por vi, karuleto,
Nur batus kun ĝoj' mia kor';
Neniam plu vidus vi larmojn,
Turmentus vin mia dolor',
Ho, amu min!

MARIA POSENAER.

PAROLADO

Ĉe la Esperantista Klubo en Invercargill, Nov-Zelando, de la Vicprezidanto, S-ro Field.

Ni ankaŭ ŝuldas mul e al nia neŝanĝigebla fideleco al la Krestomatio. Tie ĉi, oni malestimas la novajn sensencaĵojn. Tien ĉi la ridinda Ido ne povas eniri.

Kio, do, estas Ido? Ĝi estas malbeninda frenezo, kiu senĉese ŝanĝas la Zamenhofan lingvon por plibonigi ĝin, sed ju pli ĝi plibonigas la lingvon, despli la lingvo malboniĝas. Tiam la malsaĝaj, persistaj plibonigistoj rekomencas sian vanan, senfinan plibonigadon.

Ido estas menŝogo. Oni nomis ĝin Ido por kredigi, ke ĝi estas ido de Esperanto, sed efektive ĝi estos malnobla infano de trompanto.

Ido similas al epidemio. Ĝi estas mikrobo. Kiam la Idmikrobo infektas sian klubon ĝi kreas febran malpacan. Kelkaj Idiĝas, aliaj restas fidelaj, sed la plej granda parto enuas en la malpaco, perdas paciencon, perdas intereson, kaj ĉesas kunveni. Tiumaniere la klubo disfalas en tri partiojn, malfortiĝas, kaj eble mortas.

Ido naskiĝis en Francujo, sed feliĉe ĝi ne povis disvastiĝi en Granda Britujo. D-ro Zamenhof mem diris, ke la Angloj staris kontraŭ la malamiko kiel unu homo. Ni povas fanfaroni, ĉar la Invercargill'a Kulbo sekvis la ekzemplon de nia patrujo. Ni ankaŭ staris kontraŭ la malamiko kiel unu homo. Kiam la Idisitoj penis delogi nian klubon, ni forŝovis ilin, kaj ni rapidigis ilian forkuron per malantaŭa puŝo de la Esperantista boto.

Sed kian riproĉon, kian mallaŭdon meritas tiu senhonta, egoista ĉesperfidulo, la elpensinto de Ido! Li atakis la francajn klubojn, detruante kaj malpicie triumfante. Li furiozis kontraŭ la verda stelo. Lia malsankta ambicio atencis renversi la Zamenhofan lingvon. Li volis eksigi nian karan Majstron por altigi... sin!

Tiam la Esperantistaro indignante elpelis lin. Li falis kiel Lucifero. Li mal-supreniris en la mallumon.

Ĉiu granda entrepreno devas nepre renkonti du diversajn specojn de kontraŭaĵoj, nome, la eksteran bataladon kaj la internan disiĝon. Esperanto spertis la necviteblan sorton, kaj trapasis venkinte. Honoro al la francaj batalantoj, kiuj defendis la purecon de la lingvo, kaj venkis. Triumfu ili, aplaŭdu ni!

REGULOJ

Se vi iĝas patro, estu ĝoja, sed komprenu la gravecon de via misio. Estu por via filo fidela protektanto. Agu tiel ke li ĝis estu dekjara, vin timu ke ĝis dudekjara li vin amu, que ĝis la morto, li vin respektu.

Ĝis dekjara, vi estu sia majstro; ĝis dudekjara sia patro, ĝis la morto sia amiko. Memoru doni al li bonajn instruadojn anstataŭ ol ĝentilajojn. Ke li devu al vi danki pro klara sciado, anstataŭ pro frivola eleganteco. Farigu lin homo, anstataŭ ol lertulo.

Diru la veron, praktiku la justecon, pensu kun rekteco.

Agu rilate la homoj, same kiel vi volus ke ili agus rilate al vi. Neniam agu malbonaĵojn, agu ĉiam bonaĵojn.

Estimu viajn samulojn.—Lasu paroli la homojn, ĉar la parolo estas el argento dum la silento estas el oro. La vera religio konsistas en la bonajn kutimojn kaj en la virta praktiko. Rigardu, auskultu, pensu, silentu kaj agu konsekvencajn kaj justece. Amu la humilajn, kompatu la malsortulojn, malproksimigu de la malbonuloj, sed malamu nenium.—Agu la bonon pro la bonamo mem.

Parolu sobre kun la grandaj, singardeme kun niaj samuloj, sincere kun niaj amikoj, dolĉe kun la malgrandaj, karese kun la malriĉuloj.

Aŭskultu ĉiutempe la voĉon de via konscienco, ĝi estas via juĝisto.

Respektu fremdajn veturantojn, iliaj personoj estu sanktaj por vi.

Neniam flatu vian fraton; ĝi estus perfido; se via frato flatas al vi, timu ke li ne putrigu vin.

Helpu la malriĉulojn; ĉiu ekĝemo kiun via malmoleco el ili elŝiros, estus malbeno kiun falos sur via kapo.

Evitu la malpacetojn; antaŭsciigu la insultojn; ĉiam obeu la prudenton.

Se vi ruĝiĝas de via stato, estas malhumileco; pensu ke ne estas la loko kiu honorigas aŭ malhonorigas la homon, sed la maniero laŭ kiu li ĝin plenumas.

Legu kaj profitu la legitaĵojn; rigardu kaj imitu la agindaĵojn; pripensu kaj laboru ĉion farante laŭ taŭgeco de viaj samuloj; tio ĉi kune estas labori por vi mem.

Ne juĝu sen pripensado la homajn agojn.

La ĉefa afero de la sciado, diris Volnej, konsistas scii dubi. Do ni dubu kaj analizu.

Laŭdu malmulte sed mallaŭdu ankoraŭ malpli multe; pensu ke por bone juĝi la homojn estas necese sondi iliajn korojn kaj esplori iliajn intencojn.

Estu kontenta ĉie, pri ĉio kaj kun ĉio se al la honoro ne estas kontraŭa.

Respektu la virinojn, neniam trouzu pri ilia malforteco kaj mortu anstataŭ ol ilin malhonoru.

Jen la vera vivo.

A. MELIS

Barcelono, Junio 1910^a.

Kristino el Svedujo, ofte kaj atente rigardadis la statuon de la «Vero» iam, kortegano, diris al ŝi: «Via reĝa Moŝto estas la sola el la suverenoj al kiu plaĉas la «Vero».

—Hol ĉiuj veroj ne estas marmorajl, ŝi respondis.

(De «Unu fojon»)

IDILIO

De A. Bori Fontestá

*Flirtas tra tilio
bela papilio
kaj ĉe floro haltas,
kisas ĝin, foriras,
liom longe iras
ke ne plu vidiĝas
kvankam vido saltas.*

*Ĝis kiam ĝin vidis
lilifloron gvidis
serena freŝeco;
kiam malaperis,*

*floro tre suferis
ĝin mortis malĝojo
de l' forlasiteco.*

*Estas idilio
sunkuŝharmonio
en iesa koro;
estas ekdeziro,
mallonga deliro
alportanta nokton,
kaj mortinta floro.*

Tradukis el kataluna lingvo
JOSEP ANGLADA PRIÓ.

DIVERSAJ SCIIGOJ

Laŭ ni legis en la Junia Oficiala Gazeto Esperantista la nombro de Propagandaj Societoj kaj Grupoj Esperantistaj dum la jaro 1909^a en diversaj Nacioj estis tiel:

Ĝeneralo: Austrio-Hungarujo, 164; Belgujo, 38; Britujo, 175; Bulgarujo, 17; Danujo, 12; Francujo, 249; Germanujo, 222; Hispanujo, 73; Holandujo, 31; Italujo, 10; Norvegujo, 4; Portugalujo, 3; Rumanujo, 14; Rusujo, 85; Svedujo, 22; Svisujo, 26. *Afriko*: 12. *Ameriko*: Norda, 175; Suda, 75. *Azio*: 28. *Oceanio*: 12.—Sumo: 1447.

La Gazetoj Esperantistaj dum la sama jaro estis la jenaj:

Ĝeneralo: Austrio-Hungarujo, 13; Belgujo, 1; Britujo, 9; Bulgarujo, 2; Danujo, 2; Francujo, 22; Germanujo, 13; Grekujo, 1; Hispanujo, 3; Holandujo, 4; Italujo, 1; Norvegujo, 1; Portugalujo, 1; Rumanujo, 2; Rusujo, 3; Svedujo, 1; Svisujo, 5. *Afriko*: 2. *Ameriko*: Norda, 11; Suda, 4. *Azio*: 4. *Oceanio*: 1.—Sumo: 106.

Fine, jen, resumita la Statistiko de la nombro de libroj kaj broŝuroj pri kaj en Esperanto, je la 31^a de decembro 1909^a:

Propagando, 307; Instruado, Lernado, 510; Verkoj pri diversaj temoj, 257; Literaturoj, 268; Historio, Geografio, Vojaĝoj, 30.—Sumo: 1342.

Por pliaj detaloj vidu la nomitan Oficiala Gazeto Esperantista, 3^a jaro, n.º 1 (23), 25^a Junio 1910^a; Redakcio kaj Administracio: 51, rue de Clichy, Paris.

**

Dum ĝenerala kunveno okazinta la estintan Junion en Tarragono estis elektita la jena komitato por la tiea Grupo Esperantista: Prezidanto, Johano Molas; Vicprezidanto, Jozefo Vidal; Sekretario, Danielo Roig; Vicsekretario, Francisko Menasach; Kasisto, Joano Llagostera; Kalkulisto, Paŭlo Olivé kaj Bibliotekisto, J. Solé Granel.

**

Ekskurso al Torelló.—Unu el la semajnoj de la pasinta monato okazis grava kunveno ĉe Torelló. Karakterizitaj esperantistoj el Manlleu kaj el Vich kunvenis en la spektakla salono de la societo «La Barretina» organiz-

ante interesan feston en kiu partoprenis sinjoro prezidanto de la literatura fako de la nomita societo, prezentante la esperantajn propagandistojn kaj sinjoroj Bassols (laboristo), Navás, Albagés, Palmarola (ĉi tiuj el Vich) kaj Coll Calvet el Manlleu.

Bassols parolis pri ĝeneralaj esperantaj aferoj; Navés pri la neceso de internacia lingvo, Coll pri la neskiĝo kaj disvastigado de la Zamenhof-a lingvo, Albagés pruvis sur nigra tabulo kiom facila, bela, logika kaj mirinda estas Esperanto kaj Palmarola pritraktis, ĝustatempe, la amon kaj fratecon kiu ekzistas inter la esperantistoj, malgraŭ iliaj diversaj opinioj en la aliaj aferoj.

Ĉiuj la paroladantoj estis forte kaj entuziasme aplauditaj de la ĉeestantoj. Ni kredas, fundamente, ke la dissemo falis en bona tero kaj konvertiĝos je bonaj kaj maturaj fruktoj.

Alia, kiu helpas Esperanton.—La malnova ĵurnalo «*Diario de Villanueva y Geltrú*» (62 jaraĝa) malfarmis Esperantistan Fakon en siaj kolonoj.

Ĝi petas al ĉiuj ĝesamideanoj la sendadon de ĵurnalojn, broŝurojn k. t. p. por disvastigi la esperantistan celon.

Samtempe ke ni entuziasme gratulas la nomitan ĵurnalon, ankaŭ ni permesigas rekomendi al la Esperantistaro bonvolu atendi tian peton.

Ĝia adreso estas: Rambla Paz, 17, Villanueva y Geltrú-Cataluña-España.

Ke li ĝnu eterne la gloron!— Vere ĉagrenataj ni sciis la perdon de nia estimata kaj fervora samideano **Petro Ginabreda**, okazinta la 10^{an} de la estinta Maja monato. La terura morto forprenis lin, kiam pro lia juneco kaj kompetenteco multege atendis Esperanto de li.

Kvankam malfrue, sed ne pro tio malpli sentema, ni sendas la esprimon de nia plej granda kondolenco, precipe al lia senkonsola familio: poste al la Grupo «Paco kaj Amo», dekiu la malfeliĉa mortinto estis ano kaj kie senĉese kaj senlace ĉiam li laboradis por atingi la definitivan triumfon de nia Sankta Afero «Esperanto».

La nova Komitato de la Societo «Esperanto kaj Patrujo», str. Copons, 7 1^a, estas tiel: Prezidanto, S-ro Jozefo Matheu; Vicprezidanto, Manuelo Bermudez; Sekretario, Juliano Pujol; Vicsekretariino, F-ino Karmeno Sandalinas; Kasisto, Joakimo Garrigosa; Bibliotekisto, Manuelo de Muga; Voĉdonanto 1^a, Rosendo Bové kaj 2^a Felikso R. Feliu.

Internacia Asocio de Instruistoj.—Por respondi al multaj demandoj kaj deziroj, la Prezidanto de I. A. I. informas ke la 1-an de aprilo S-ro Ĉejka skribis ke la tria kajero de *Internacia Pedagogia Revuo* estas kompostata. Oni do povas esperi baldaŭan ricevon kaj kontentojn.

I. A. I.-anoj vizitontaj la Ekspozicion en Bruxelles estas petataj elekti la 1-an de septembro. Tiun tagon ili povos renkonti komitatanojn, almenaŭ la Prezidanton kaj la Sekretarion ĉe la gasta tablo de «Le Moulin D'or», 30, strato d'Assaut, apud la preĝejo Ste. Gudule. Oni memoru kaj dissciigu. —JOZEFO ALBAGÉS, konstanta korespondanto.

La Escuela Moderna pedagogia revuo, el Madrid, ekkomencis publikigi esperantan paĝon. Protektu ĝin, karaj samideanoj instruistoj.

BIBLIOGRAFIO

En tiu ĉi fako oni konigos la verkojn kies aŭtoroj donacis du ekzemplerojn al T. E.

LA CONSTRUCTION LOGIQUE DES MOTS EN ESPERANTO.—Universala Esperanta Librejo, 10, Rue de la Bourse, Genève. Prezo 0'65 Sm.

Per tiu signifa prezo oni povas gustumi 83 paĝojn plenaj je nutra prozo, kiun en ili verŝis tiu kiu sin kaŝas sub la pseŭdonimo ANTIDO.

VENENO, unuakta komedio, originale verkita en Esperanto de Ramon Limones, 14, 1^a Anduana Vieja, Mexico. Prezo 0'50 Sm.

Amuza komedieto! Kvar virinoj kaj kvin viroj estas la personaro por ĝin ludi. Kiu aĉetos tian komedion, aŭ despli bone ridigilon, certe ne pentos.

ESPERANTO-POŝKALENDARO POR 1910.—Prezo 0'40 Sm., Johannisplatz, 45, Leipzig.

UN RETRAT (PORTRETO).—Drama escrit en Esperanto per Nadina Kolovorat. Versio catalana de Eulalia Rosell. Preu 0 75 ptes. Bartomeu Baxarias, editor, Passatje de Mercader, 10, Superior, Barceloua.

Ekzemplo imitinda estas tiu de nia samideanino Eulalia Rosell! La katalunan tradukon kiun ŝi faris zorgeme de la interesplena dramo de la eminenta verkistino Nadina Kolovorat, estas unu el la plej efikaj rimedoj por disvastigi Esperanton en nia lando.

Ni ĵus ricevis ekzempleron de la fama kanto *Sing me to sleep* (Kantu por mi) eldonita en Esperanta lingvo. La belega poezio estis tradukita de tiu lerta angla esperantisto S-ro G. L. Browne, unu el la konsilantaro de la Brita Esperanta Asocio. La ario estas la belharmonia mondkonata melodio de Edwin Greene. La kanto estas aĉetebla ĉe ĉiu muzikvendisto, aŭ se oni sendas poŝtmandaton por unu spesmilo (2 ŝilingoj angle) al *Pillips & Page*, 5, Oxford Market, London, W., England.

Al la antaŭa ricevo ni devas aldoni tjun de la bela **VALSO ESPERATO** de Me. René de Saussure, dediĉita al S-ino Emilie Heer. Prezo: 2'50 fr. (1 Sm.) Stich nud Druck von C. G. Röder G. m. b. H. Leipzig-Germanujo.

REAPERANTOJ. Familia dramo de Henrik Ibsen-Unua Akto. Tradukis O. Bünnemann. Prezo 0'40 Sm. Esperanto Verlag Möller & Borel. Berlin.

Tiu ĉi kajero (17 paĝa) estas la 12^a de la Esperanta Biblioteko Internacia (kiun ĉiu bona Esperantisto devas posedi) kaj, tiel kiel ĉiuj aliaj elirantaj, ĝi estas tre interesa kaj bonesperantastile tradukita.

NOTO PRI LA INICIOLO MATEMATIKA. Jacques Gamescasse. Ludo de kubetoj kunigeblaj faciliganta en familioj kaj lernejoj la praktikadon de la metodo prezentita en la verko «Iniciado Matematika» de C. A. Laisant. Prezo: 1 franko (Sm. 0.40). Librejo Hachette kaj K^o. 79, Boulevard Saint-Germain. Paris.

Tiuj kiuj havas infanojn por eduki, tuj komprenos la gravecon de tiu nova ilo, kian funkciadon klarigas la libron.

La Inicilo Matematika konsistas el: 1 skatoleto; 600 kubetoj blankaj;

600 kubetoj ruĝaj; 144 vergetoj ŝtalaj kaj 1 broŝureto (Esperante aŭ France redaktita), vendata de la sama Fermo je la prezo: 22 frankoj (Sm. 4.75).

La Inicilo Matematika prezentas tri ecojn karakterizajn.

A.—Ĝi konigas samtempe: la principojn de la Nombro Dekuma kaj la formojn Geometriajn elementajn, do, la Sistemon Metran;

B.—La maniero uzi ĝin, estas facila, la objektaro estas simpla; nur du specoj da objektoj por fari multajn kombinojn;

C.—Ĝi ebligas la kontrolon tuj, *Aŭtomatan* (se tiel oni povas diri), de la kombinoj faritaj. Ciu eraro estas montrata aŭ per manko, aŭ per troo.

Pro tiu rapideco de kontrolo, la *Inicilo Matematika* faciligas la metodon objektan en la multenombraj lernejoj.

Ĝiaj ĉefaj aplikoj estas la jenaj:

I.—Edukado Patrina (Unua), Bildoj, Kahelaroj, Mozaikoj, konstruo de objektoj.

II.—Nombrado Dekuma.

III.—Operacioj Aritmetikaj: Adicioj, Subtraho, Multipliko, Divido; Frakcioj, Radikoj; Teoremoj aritmetikaj, algebraj kaj geometroj kokretigitaj, kaj.

IV.—Sistemo Metra.

Nebezone diri ion plu pri tiu ilo eduka, kies sukceso estas utiliga al infanoj ĉiulandaj.

**

ESPERANTA PSIKISTARO. Prezo ne montrita. Presejo de Buerbaum. Van der Goten. Avenue Moretus, 60, Anvers.

Por obteni ekzempleron de tiu ĉi broŝuro adresu vin al la: «Bureau permanent d'étude des phénomènes spirites», Courte Rue de la Boutique, 15, Anvers, Belgujo.

**

GVIDLIBERETO DE «LE CREUSOT». Eldoninta France kaj Esperante, Prezo: 0.75 frankoj (0.30 Sm.). Esperanto Oficejo. 18, Place Schneider, Le Creusot (France).

Jen la epigrafoj de la bildoj enhavataj en tiu libro, per kiuj oni povas konkludi ĝian intereson kaj utilecon.

Fabrikejo de «Le Creusot, 1782.—Fabrikejoj de S-roj Schneider kaj K-jo. Le Creusot. Nuna.

Stato.—Lamenado de malgrandaj profilaĵoj.—Kanono je 27 c/m por la Japana Ŝtato. La plej dika lamenilo de la mondo; lamenado de lingoto je 50 tonoj (?). Fabrikejoj Schneider; ĝenerala vidaĵo (Orienta flanko). Lieĝa kanono «Long Tom» Transvaal. Permonta kanono je 75 m/m, modelo 1898. Premilego je 6.000 tonoj, por kurbigi la kirasladoj. Fluigado de lingoto je 50 tonoj por kiraslado. Pistilmartelo je 100 tonoj. Laborejo por lastalfaro de kirasladoj. Kovertilo «Bessemmer». Altformegoj N.oj 2, 3, 4. Unua lokomotivo konstruita de S-roj Schneider (1838) Skalo 1 c/m 150°. Lokomotivo «Pacific» nune konstruata en la fabrikejoj Schneider (1910) Skalo 1/150°. Turnado de la ĉambro de kanono je 24 c/m. Vidaĵo de la halo.

La lasta pago estas dediĉita al la plano de la urbo «Le Creusot»

La tiea Esperantista Grupo, eldoninto de tiu gvidlibreto, meritas la plej grandan gratulon, kaj ni esperas ke ĝi bonvolos akcepti tiun nian, tute sincera.

**

LA TRANSKRIBO DE LA PROPRAJ NOMOJ.—Esperantista Centra Oficejo: Prezo, 1 franko. 51, Rue de Clichy. Paris.

En ĝi, la Prezidanto de la Lingva Komitato, Rektoro Boirac, diras: «Ĝajnis al mi tute konforme al la spirito kaj labormetodo de la Lingva Komitato publikigi la laborojn de ĝiaj komisioj aŭ sekcioj, sed nur por gvidi la evoluadon de la lingvo, nenion trudante nek dekretante. La Subkomitato pri la Propraj Nomoj opiniis, ke estus bone traduki la proprajn nomojn jenamaniere; nek ĝi nek la Lingva Komitato trudas tiun opinion al la publiko; ili nur ĝin publikigas por gvidi la publikon, sed al tiu ĉi ja apartenas, se ĝi deziras, ekprovi tiujn novajn formojn, ilin eksperimenti, haj konstante uzi, se ĝi trovas ilin praktika».

Post *Antaŭnoto*, oni povas legi: 1, Unuaraporto de S-ro. Gaston Moch; 2, Kontraŭraporto de S-ro. Adam Zakrzewski; 3, Klariga noto de S-ro. Johano Schröder; 4, Dua raporto de S-ro. Gaston Moch; 5, Listo de propraj nomoj koncerne personojn, geografion kaj historion, proponataj de S-roj Bein Moch kaj Schröder.

**

1910. TUTMONDA JARLIBRO ESPERANTISTA.—Prezo 3 Fr. Hachette et C.^{ie} 79, Boulevard Saint-Germain. Paris.

Tiu nova eldono estas prezentita laŭ tute nova plano, kiu certe aprobos la Esperantistaro.

En la unua parto sin trovas la oficialaj Institutoj de Esperanto; *Lingva Komitato, Konstanta Komitato de la Kongresoj, Kongresa Kaso, Centra oficejo*; en la dua, *la Internaciaj Asocioj, Institutoj kaj Oficejoj*; en la tria, *la naciaj, regionaj kaj urbaj societoj*.

La verko finas per: I, Internacia korespondado, t. e. la listo de la nomoj kaj adresoj de ĉiuj esperantistoj, kiuj *deziras korespondadi* kun samideanoj, kaj petis pri sia enskribo en tiu speciala fakto de korespondado antaŭ la 1.^a Decembro 1909; II, Komercistoj, kiuj uzas Esperanton; III, Gazetoj Esperantistaj; IV, Novaj Esperantaj verkoj.

Kiel la eldonistoj, certe ni esperas ke la nova eldono estos bone akceptata de niaj samideanoj, kaj fariĝos unu el la plej utilaj libroj, kiujn vera Esperantisto devas havi sur sia skribotablo.

**

VORTARO ESPERANTA. PORTUGALA. Kompilata de Tobias R. Leite fondinta grupano de l'«Suda Stelaro» de Kampinas, la unua esperantista grupo en Brazillando. Prezo: Nemontrita. Francisco Alves & C.^a Rio de Janeiro, 166, Rua do Ouvidor, Rio de Janeiro aŭ Librairie Hachette & C.^{ie}, 79, Boulevard Saint-Germain, Paris.

Laŭ diras la aŭtoro en sia *Antaŭparolo* li preparis tiun ĉi verketon por lia persona uzado, sed, laŭirante la opinion de kelkaj samideanoj, kaj precipe de lia kara amiko Dr.^o Keating, kiuj trovis ĝin, iamaniere, taŭgebla por la novaj Esperantistoj, li konsentis je ĝia presado.

La verkoj, el kiuj estas ĉerpita la kompilado de tiu ĉi utila vortaro, estas tiuj de la S-roj: L. de Beaufront; Th. Cart, Merkens et P. Berthelot; D-ro Zamenhof; Hermann Jurgensen; Paul Boul et kaj Ch. Verax.

**

LA DEVO.—Parolado adresita al la Sinjorinoj de Genevo kaj de Laŭzano. De Ernest Naville asociita fremda-membro de Franca Instituto, honora prezidanto de «Svisa Esperanta Societo». Tradukita de S-ro René de Saussure, prezidanto de «Svisa Esperanta Societo». Kun portreto de l'aŭtoro. Prezo ne montrita. Genevo, Librejo Kündig, 11, Corratierie.

Tiu parolado pri la devo estis farata en du fojoj, en Genevo, poste en Laŭzano, dum vintro 1867. 1868. Ĝi estis redaktata per stenografado kaj unue publikigita en *Bibliothèque universelle*

Aperinta antaŭ ol 30 jaroj, tiu volumeto estis rapide el ĉerpita. Oni ĝin ofte postulis kaj certe agrabla pro la multaj legantoj estos ĝia represio.

Ne estas bezone insisti pri la granda intereso, kiun povas havi por la Esperantistoj traduko de verko de Ernest Naville, kiu estis samtempe plej fama filosofo.

MIKAELO CASES

GAZETARO ESPERANTISTA

De Ruslanda Esperantisto.—Rusujo, Petesburgo. Rusujo.

«Samsuferantoj:

—Esploru, mi petas, sinjoro Doktoro, mian guvernistinon: ŝi manĝas kaj trinkas, sed restas ĉiam kuŝanta en lito; ĉu ŝi estas malsana?

La doktoro vizitas la guverniston kaj komandas, kion ŝi havas?

—Oni ne pagas mian salajron tial mi estas lito-respondis ŝi.

—Ho!-ekkris la doktoro—tiu okaze bonu mian malmulte ŝoviĝi, por ke mi povu kuŝi apud vi: oni ne pagas ĉi tie ankaŭ al mi eĉ unu kopekon por mia dujara kuracado!»

«Rusa proverbo:

—Kial do vi ne volas esti mia kompaniano en tiu ĉi afero?

—Laŭ rusa proverbo: ansero al porkego ne estas kolego.

—Bonege; sed kial vi komparas min kun ansero?»

«Enigma:

Kia dio, kvankam malgranda, estas malagraba al manĝeguloj?» Eieto.

**

De Germana Esperanto-Gazeto.—1, Kaiser Friedrich-strasse, Magdeburg.

«En hotelo. —Vojaĝanto: Kiom kostas la ĉambroj en via hotelo?

Pordisto: En la unua etaĝo dek, en la dua ok, en la tria kvin markojn k. t. p.

La vojaĝanto elliras kaj rigardas la hotelon de ekstere. Tiam li revenas kaj diras: Pordisto, redonu al mi la pakejon, via hotelo ne estas sufiĉe alta por mi.—H. SELMER, Lübeck.»

**

De Juna Esperantisto.—33, Rue Lacépède, Paris.

«—Bubo: Kion vi diras, kara onklo, al tiu, kiu sidigis sur vian ĉapelon?—Onklo: Certe mi ne tre laŭdis tiun bruton. Mi diras al li: malspritulo, sentaĝulo, idioto. —Bubo: Ĉu mi devus diri la samon al tiu, kiu sidigis sur mian ĉapelon?—Onklo: Ne vi estas ankoraŭ infano; vi devus ĝentile atentigi tiun kanajlon. —Bubo: Do, kara onklo, mi ĝentile atentigas vin, ke vi sidas sur mia ĉapelo.»

**

De La Spritulo.—Könerstrato, 31, Leipzig. (Germanujo).

«Bona klarigo.—Juna fraŭlino sidas ĉe festmango apud fama fizikscienculo. Opinante, ke ŝi faros bonan impreson, parolante kun li pri lia scienco, ŝi diras: Ĉiam mi multe interesiĝis pri fiziko, sed unu aferon mi ne bone komprenis, nome la diferenco inter 'konkava' kaj 'konkreta'; certe vi povos tion bone klarigi al mi. Hum, diras post paŭzo la scienculo, efektive, malfacila afero. Inter 'konkava' kaj 'konkreta' estas simila diferenco kiel inter 'numero' kaj 'uomaro', inter 'orkestro' kaj 'urbestro' aŭ kiel inter 'ovo de kolombo' kaj 'ovo de Kolumbo.'»

Cikatro.—Jes, tre estimata fraŭlino, estas necese, ke mi faru malgrandan operacion sur via genuo.—Ho Dio, sinjoro doktoro, ĉu oni ne vidos eble pli malfrue la cikatron?—Tio dependos nur de vi, moŝta fraŭlino, ĉu ĝi estos videbla.»

Ĉiame profesoro.—Profesoro (vestante sin): Nun mi ne scias, ĉu fariĝis mia tajloro ian frivolan spritajon aŭ ĉu li estas efektive tiom malsaga; en tiu ĉi vesto mi neniel povos paroladi; supre mankas butontruo kaj malsupre butono.—I. PODLIPSKY, Sunichow.»

A. BARDAJL

JARLIBRO DE LA KATALUNA ESPERANTISTARO


Societat FRATECO - Sant Feliu de Guixols - Rambla Vidal, 8, 1.

- | | |
|--|--|
| 1 Antoni Llinàs, Cubies, 13 | 22 Joan Carig, Professó, 59 |
| 2 Antoni Sabater, Alba, 13 | 23 Josep Vila, Caimó, 2 |
| 3 Antoni Ribas, Eres, 19 | 24 Joan Pastells, Campaneria, 17 |
| 4 Benet Dalmau, Penitencia, 28 | 25 Jaume Matarrodona, Sant Pere, 9 |
| 5 Baudili Vicenc, Caimó | 26 Jaume Vendrell, Baixada Pont, 6 |
| 6 Cels Terradas, Rambla d'Antoni Vidal | 27 Josep Blanch, Caimó, 32 |
| 7 Carles Donatiu, P.b. ^a Bender, Convent | 28 Joan Sicarto, Volta |
| 8 Daniel Bas, Sant Pere, 15 | 29 Josep Puigman, Sant Joan |
| 9 Enlli Presas, Penitencia, 9 | 30 Josep Geli, Santa Llucia |
| 10 Estebe Junca, Girona, 57 | 31 Lluís Julià, Sant Teju, 5 |
| 11 Francisco D. Bruguera, Professó, 4 | 32 Martí Regimios, Bonaventura, 13 |
| 12 Francisco Planellas, Sant Lorenc, 5 | 33 Narcís Soler, Caimó, 21 |
| 13 Francisco Soler, Caimó, 24 | 34 Pere Campistol, Gerona, 19 |
| 14 Francisco Vicer (Pbre.), May, 27 | 35 Pere Suñer |
| 15 Genar Llahona, Trav. ^a Barceloneta, 11 | 36 Pere Mallart, Estrel |
| 16 Joan Junca, Pl. Margall, 8 | 37 Rosend Reixach, Algavira, 1 |
| 17 Josep Cañellas, Creu, 45 | 38 Ramon Saiz, Carretera Girona |
| 18 Joan Pagès, Jacint Verdaguer, 4 | 39 Tomas Torroella, Travessia Riera, 2 |
| 19 Joan Bordes, Caimó, 28 | 40 Vicenc Raurich, Rutlla, 13, 2. ^a |
| 20 Joaquim Casanovas, Bailén, 1 | 41 Benet Girona, Sol |
| 21 Joan Cufs, Algavira, 97 | |

Societat TARRAGONO ESPERANTA - Tarragona

- | | |
|--|--|
| 1 Joan Molas, Pla de la Catedral, 7 | 15 Josep López, Santa Tecla, 11 |
| 2 Josep Vidal, Plaça dels Angels, 3 | 16 Jaume Trillas (Pbre.) Plaça de l'oli, 2 |
| 3 Daniel Roig, Major, 11 | 17 Joan Franco, Smit, 31 |
| 4 Francisco Menasanch, Hospital, 5 | 18 Antoni Roig, August, 4 |
| 5 Joan Llagostera, Destral, 7 | 19 Josep Castañós, Plaça de la Font, 22 |
| 6 Pau Olivé, Rambla Sant Carlos, 26 | 20 Carles Vidal, Rambla Sant Carlos, 31 |
| 7 Joan Solé, Rambla Sant Joan (Borsá) | 21 Manel Dentú, Smit, 3 |
| 8 Francisco Torres, Barcelona, 4 | 22 Francisco Torregrosa, Sant Fructuós, 4 |
| 9 Rafel Campeny, Sant Pere (Serrall) | 23 Josep González, Orús, 7 |
| 10 Antoni Cabré, Rambla Castelar, 20 | 24 Baptista Gallart, Real, 15 |
| 11 Antoni Escoda, Plaça de la Font, 17 | 25 Salvador Ferrer, Rambla St. Carlos, 30 |
| 12 Santiago Ferrer, Rambla Sant Joan, 56 | 26 Rosend Melich, Sant Domingo, 6 |
| 13 Joan Canals, Hospital, 3 | 27 Joan Rabada |
| 14 Lluís Roig, Ntra. Sra. Claustre | |

MANUFAKTURO DE KOMERCAĴOJ POR VOJAĜI
ON VENDAS MALALTPREZE



Manuelo Ballespi

Strato Ample, 43 - BARCELONA

KORESPONDANTA FAKO - Kosto de tiuj ĉi anoncoj: po 0.10 frank ĉiu linio

Fino Louise Briggs, West (daj gesamideanoj. Ĉiam res- D'or), Francujo, deziras inter-
Lea Armley Leeds, Angl. pondos terŝanĝi poŝtkartojn kun la

Solvo de la hieroglifo

(Kom' post i) KOMPOSTI